

La Prezidanto, kiu estas la respondeca direktoro de nia revuo, kaj la Redaktoro dankas al ĉiuj samideanoj sendintaj artikolojn, leterojn kaj raportojn. Ni akordiĝis pri kelkaj fundamentaj temoj kaj ni faris ĉion eblan por doni utilajn ideojn al la legantoj: multaj el ili povas memkompreneble trovi tiujn ideojn ankaŭ en religiaj gazetoj de sia lando pli frue kaj pli klare; sed ni pensis precipe al tiuj, kiuj tre volonte vidas kristanajn ideojn disvastigitajn per la internacia lingvo Esperanto, kaj al orientaj fratoj, kiuj konas la vivon kaj multajn problemojn de la Eklezio nur per nia revuo.

Mi bone scias, ke deziroj kaj gustoj estas tre diversaj: tial mi ne miras, ke multaj trovas nian revuon interesa kaj utila kaj aliaj trovas ĝin monotona kaj neinteresa.

Ni klopodos, ke nia gazeto - restante fidela al la Evangelio kaj al la direktivoj de la S. Seĝo - intereso nombbron ĉiam pli vastan de legantoj, ke ĝia nivelo fariĝu pli alta kaj ĝia lingvo pli bonstila.

Ni plilarĝigis nian redakcian komisionon kaj invitis kapablajn IKUEanojn doni malavare sian helpon. La legantoj esprimu siajn dezirojn sen timo. Ni revenas volonte al la rubrikoj « Vento por nia muelilo » kaj « Lingva angulo ». Mi atendas materialon, alie... la muelilo ne funkcias. La Prezidanto kaj mi bondeziras tutkore al ĉiuj legantoj feliĉan kaj benoriĉan Paskon.

Sac. Felice Ruaro

PAPA VORTO

La homoj devas serĉi Dion.

Oni ne povas nei, ke la homo havas naturan tendencon al la religio. Sed tio mirigas kaj ĉagrenas nin: ke por la homo progresinta kaj evoluinta estas pli malfacile favori tiun tendencon kaj ĝin pli konkrete kaj kontentige esprimi.

Tio mirigas kaj ĉagrenas, precipe ĉar ŝajnas klare, ke la ĝenerala kaŭzo de la moderna senreligieco estas la moderna progreso mem. La homo

progresis en ĉiuj kampoj: de sia konscienco, de sia scienco, de sia agado, sed li malprogresis en sia kapableco komuniki kun la religia mondo. Ĉu la progreso vanigas la religion?... Ne estas vane serĉi la kialojn de la negativa nuntempa evoluo de la religia sento. Tiu serĉo estas deva kaj fekunda: se ni pretendas esti plenkreskuloj, t.e. inteligentaj kaj liberaj homoj uzantaj intense kaj logike la homajn kapablecojn, ni devas meti antaŭ nin la religian problemon en ĝia konkreta pleneco: la problemon de la fido... Ni evitu la apologion: sufiĉu al ni la analizo, la diagnozo. Ni faru kelkan simplan demandon: unue: ĉu estas facile alveni al la religia kono nature, t.e. per la homa menso, aŭ per la fido?

Ni respondas tuj: ne.

Dio estas sur la vertico de niaj deziroj, je la radiko de niaj serĉoj; sed Li restas mistero kaj tial turmento kaj dramo de la homa spirito. Pro tio ne estas miro, ke la religia problemo estas malfacila kaj al multaj homoj ŝajnas nesolvebla pro manko de bona serĉo... Ni uzas ĝenerale niajn kapablojn bone kaj kontentige por atingi deziratan celon, kaj tiurilate la progreso kutimigis nin estis tre atentaj, tre lertaj kaj per tio atingi mirajn konkerojn. Sed la moderna mentaleco kontentiĝas per praktitaj certecoj kaj utilo de ĝia nocia kaj scienca rezonado kun grava domaĝo de la rezonado filozofa kaj de la serĉo de la vero sur la vojoj de la morala honesto. Tiel ĝi pli malfacila la religian vivon kaj la akcepton de la fido. Metoda eraro, preterlaspeko, renonco al la uzo de niaj spiritaj kapabloj, materialista maldiafaneco malhelpis la nuntempan homon koni la religian mondon kaj la necesan realecon, kiun ĝi enhavas kaj malfermas al la humilaj kaj saĝaj serĉantoj de la dia lumo.

Survoje al la perfekta unueco.

Ni ĉiuj estas kristanoj, per la bapto ni estas insertitaj en la mistika korpo de Kristo, kiu estas la Eklezio.

Ni ĉiuj estas filoj de Dio, la bonega ĉiela Patro; ni ĉiuj kredas je Kristo Sinjoro kaj atendas de Li la pardonon kaj la savon pere de la sama Sankta Spirito viviganta kaj sanktiganta.

Tio estas la fundamento de la ekumena unueco, kiun ni arde serĉas. Ekumena estas la intenco de tiu ĉi ceremonio preparita por akcepti kaj saluti inter ni eminentan reprezentanton de la Ortodoksa Eklezio, la Metropoliton Melitonon, al ni senditan de Lia Sankta Moŝto Atenagoro, patriarko de Konstantinopolo, tre piemo kaj al ni tre kara, por porti al ni, kiel vi scias, la « Tomos Agapes », la volumon de la karito, kiu entenas la dokumentojn pri la korespondado kaj la rilatoj okazintaj dum la lastaj dekdu jaroj inter la Patriarkejo de Konstantinopolo kaj la Romia Eklezio, ĝojegantaj ĉar ili vidas sin kiel branĉojn de sama arbo,

el la sama radiko, sed ankoraŭ suferantaj pro tio ke ili ne povis ankoraŭ efektiviĝi la perfektan unuecon trinkante el la sama mistika kaliko.

Paco kaj justeco.

La paco ne estas insido. La paco ne estas mensogo fariĝinta sistemo. Des malpli ĝi estas tiraneco totala kaj senkompata...

Se ni serĉas, el kie ĝi vere devenas, ni rimarkas, ke ĝi enprofundigas siajn radikojn en la sinceran senton de la homo.

Paco, kiu ne rezultas el la vera kulto de la homo, ne estas vera paco. Kaj kiel ni nomas ĉi tiun senton sinceran de la homo? Ni nomas ĝin justeco.

Ĉiu kristano devas agi.

Ni ĉiuj, firme fidelaj al la kristanaj principoj, devas deziri kaj agi, por ke ĉi tiuj veraĵoj de la vivo ne estu renversataj de tiu ĉi ĝenerala transformiĝo. Ni aludas al la krizo de la morala sento, kiu ŝajnas cedi al indeferenco permesanta kaj favoranta malmoderajn morojn kaj kreskantan krimecon.

KUNLIGITA KUN DIO

Estas homoj kiuj opinias, ke ilia vivo ne estas sukceso. Sed kiam vivo estas sukcesa? Laŭ kiu vidpunkto ni prijuĝas nin? De la intelekto aŭ de la kredo? Ni havas la ekzemplon de Kristo kaj de lia patrino. En la mondo validas la povo, la mono, la sano k.t.p. Sed Kristo ne respondas al tiuj normoj. Ŝajnas ke lia vivo estas malsukceso. Post multe da sufero li mortis sur la kruco. Li suferis pro la miskompreno de la homoj. La amaso estas kruela kaj senpardona, fiera kaj pedanta.

Sufero estas la plej alta formo de amo, fruktodona por la savo de la mondo. Kristo estis virga homo kaj tre harmonia homo. Li liberigas nin de la peko kaj de la morto, kaj montris al

ni la vojon de la eterna vivo. Lia vivo estas la plej sukcesa. Eble vi konas per propra sperto la suferon de la malkompreno, la suferon de nia tempo, la suferon de la malriĉuloj, la suferon de la malsano, kaj vi komprenas, kial VI suferas kaj ne aliaj, kiuj vivas sen Dio.

Sed la kredulo trovas forton en Dio kaj povas akcepti, ke per sia vivo li kun-savas en tiu ĉi tempo, en kiu oni neas Dion.

Maria, grandigu nian kredon!

Maria, havu kompaton pro nia malriĉeco en la kredo!

Maria, donu al ni la riĉecon de la kredo!

M. St. (Nederlando)

S. Pio X kaj Esperanto.

La unua numero de E.K. en 1903-a malfermiĝis per la jena poemeto:

AL LIA PLEJ SANKTA MOŝTO PAPO PIO 10-a

Ĉesis jam viva malgajo publika,
Dio ĝojigis la Kristeklezion:
Sur trono Petro la mond' katolika
Salutas Pion.

Grincu per dentoj infera serpento!
Nin ne timigas jam via envio:
Tra l' maraj ondoj kaj forta la vento
Nin gvidos Pio!....

Oni diradu, ke Petra la Ŝtono
Jam detruigis, fariĝas nenio...
Granda mensogo! Jen sankta la trono
Kaj sur ĝi Pio!....

Tial laboru sen tim' kristanaro
Ĝis kiam estos, laŭ vorto de Dio:
Unu paŝtisto kaj unu ŝafaro...
Gvidu ĝin Pio!...

La 29-an de majo 1954-a okazis en Romo io eksterordinara: en la senkompara scenejo de placo S.ta Petro — ĉar ne estis sufiĉe vasta la baziliko por enteni la popolamason el pilgrimantoj — Papo Pio 12-a proklamas per la solena formulo la sanktuligon de Papo Pio 10-a, kaj tuj poste eldiras paroladon, per kiu antaŭ ĉio li reliefigas la eksterordinarecon de la fakto, ke unuafoje en la historio de la Eklezio la Sanktuligo de Papo estas proklamata de tiu, kiu havis la privilegion deĵorj je lia servo en la Vatikano.

La postan tagon posttagmeze la vitra ĉerko kun la korpo de Sankta Pio 10-a estis transportita en la bazilikon de S.ta Maria la Granda, kie ĝi restis unu semajnon, kaj estis celo de senfina kolono de piuloj, kiuj deziris tuŝi ĝin per objektoj, por poste konservi ilin kiel relikvojn. Nun ĝi estas denove en la baziliko de S.ta Petro, kaj antaŭ ĝi haltas surgenu en silenta fervora preĝo la sinsekvaj vizitantoj.

La nomo de Pio 10-a por la esperantistoj ĝuas tute specialan estimon, kaj lia sanktuligo estas motivo de intima ĝojo. Li estis la unua Papo, kiu efektive interesiĝis favore al nia afero. Prezintis al li Esperanton monsinjoro Luigi Giambene (mortinta en 1944-a), kiu pro sia ofico tiam frekventis la Vatikanon, kaj plurfoje havis okazon paroli kun la Papo pri la internacia lingvo. De tiam Pio 10-a, ĉiam simpatia kaj tre afabla, kiam de tempo al tempo Li vidis prelaton Giambene, ŝerce direktiĝis al li per la alnomo « Monsinjoro Esperanto ».

Estas memorindaj pluraj aŭdiencoj donitaj al esperantistoj, dum kiuj Lia Papo Moŝto esprimis sian favoron. Jen tio, kion skribis monsinjoro Giambene al la redaktoro de « Esperanto katolika » pri la unua oficiala Papa interesiĝo la 2-an de junio 1906-a:

« La Sankta Patro min tre afable akceptis hodiaŭ matene. Mi transdonis al Li vian laboraĵon. Li legis laŭte (sed, kompreneble, malkorekte) la poemon de pastro Dombrovski, dirante ĉe ĉiu verso: « Mi komprenas ». Mi prezentis la Esperante skribitan peton de beno por vi kaj la redaktoroj de « Espero Katolika ». Ankaŭ ĝin Li legis laŭte kaj poste diris: « Mi sendos al vi skribaĵon pri tio ».... »

Kaj la skribaĵo alvenis al la katolika esperantistaro dum la dua Universala Kongreso en Genevo, kaj tekstas jene:

« El la Vatikano, la 27-an de junio 1906-a
« Via tre respektinda Monsinjora Moŝto,

mi ricevis la honoran komision sciigi al vi, ke la Sankta Patro favoranime kaj kun speciala plaĉo bonvolis akcepti la aperintajn numerojn de l' revuo « Espero katolika », kiujn vi humile prezentis al li je la nomo de pastro Emilio Peltier. Bonvolu Via tre respektinda Monsinjora Moŝto konigi al la nomita Pastro la Papan plaĉon kaj komuniki la Apostolan Benon, kiun Lia Sankta Moŝto donis al li kaj al la redaktoroj de l' Revuo. Pienuminte la ricevitajn ordonojn, kun la sentoj de grandega estimo mi diras min
tre sindonema servanto - Giovanni Bressan ».

La granda novaĵo rapide disvastiĝis inter la kongresanoj. Franca traduko de la letero estis sendita al ĉiuj ĵurnaloj ĝenevaj, kaj ĉiuj ĝin publikigis. Laŭ deziro de multaj kongresanoj, la prezidanto de la Kongreso, pastoro Schneebergen, protestanto, legis la leteron al la kunvenintoj, kiuj salutis ĝin per unuanimaj longaj aplaŭdoj. S-ano Karlo Bourlet, kvankam liberpersunlo, deklaris, ke tiu fakto estas tre grava por la progresado de Esperanto kaj tial li tre plezure ĝin aplaŭdas, kaj esprimas la deziron, ke la membroj de aliaj religioj aŭ filozofioj same klopodu, por ricevi similan aprobon de la estroj, por montri, ke Esperanto estas vere neŭtrala lingvo, kiu povas kaj devas utili al ĉiuj partioj kaj ideoj.

Specialan gravecon havas la aŭdienco donita de Pio 10-a la 4-an de aprilo 1909-a al Frato Izidoro, la poeto, kiu tradukis al Esperanto multajn katolikajn popularajn himnojn. Dum ĝi la Santa Patro, espriminte sian ĝojon pro la propono enkonduki Esperanton en la Blindulejojn, akceptita fare de la Blindula kongreso okazinta en Napolo kelkajn tagojn antaŭe, diris la profetan frazon: « Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon ».

Ankaŭ en aliaj okazoj la bona, simpla kaj afabla Papo esprimis sian grandan simpatian favoron por la paciga internacia Lingvo per trafaj frazoj, inter kiuj: « Mi vidas en Esperanto valoran rimedon por atingi la unuecon inter la katolikoj de la tuta mondo ».

La 30-an de marto 1910-a, ĉe la malfermo de la 1-a Kongreso Internacia de la Katolikaj Esperantistoj en Parizo, la prezidanto anoncis, ke la Komitato ricevis de Monsinjoro Giambene tre kuraĝigan leteron, kiu diras: « La Sankta Patro en speciala aŭdienco bonvolis ekzameni la diversajn temojn de la kongresa programo, kaj ne nur plene aprobis ilin, sed krome donis plenan indulgencon al ĉiuj gekongresanoj ». La morto de Pio 10-a en la jaro 1914-a konsistigis tre doloran perdon por la esperantistaro; sed la levado per beatigo al la honoroj de la altaroj, farita de Papo Pio 12-a en la Placo S.ta Pietro la 3-an de junio 1951- vespere, plenigis la koron de la esperantistoj, precipe de la katolikaj, de grandega intima ĝojo. Revo silente tiom sopirata fariĝis realaĵo, kaj dum la 23-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj, okazinta en Munkeno (Germanujo) je la komenco de aŭgusto de la sama jaro, la Beata Pio 10-a estis elektita ĉiela protektanto de la Katolikaj Esperantistoj.

Kaj nova motivo de ĝojo estis por la adeptoj de la paciga lingvo la sanktuligo de ilia ĉiela protektanto, proklamita, kiel mi jam diris, la 29-an de majo 1954-a vespere, en la sama superba sugestia scenejo de placo S.ta Petro.

La kulto al la nova Sanktulo disvastiĝas pli kaj pli inter la esperantistoj de la tuta mondo kaj naskas simpatiajn iniciatojn. Inter ĉi tiuj prezentis specialan reliefon la propono de Lia Kardinala Moŝto Lercaro, episkopo de Bolonjo (Italujo), kiu, en letero de la 15-a de aŭgusto 1954-a, sendante koran saluton kaj benon al la italaj esperantistoj kongresantaj en Sassari, aldonis:

« Mi akceptas kun favoro kaj lanĉas kun entuziasmo la proponon, ke la katoliaj esperantistoj de la tuta mondo fariĝu iniciatantoj por la starigo de Templo al sia Protektanto, la Sankta Pontifiko Pio 10-a: Templo, kiun mi

permesas al mi proponi starigi en ĉi tiu mia Bolonjo, kiu, tre antikva centro de kulturo por la tuta mondo, sentas en la gastamaj tradicioj la noblan taskon alproksimigi inter ili la gentojn ».

Kaj la propono de Kardinalo Lercaro fariĝis realaĵo la postan jaron. La 2-an de aŭgusto 1955-a katolikaj esperantistoj de la tuta mondo, kunvenintaj en Bolonjo por la 40-a Universala Kongreso de Esperanto, inaŭguris preĝejon dediĉitan al S.ta Pio 10-a, en kiu la jena marmorskribaĵo memorigas la eventon:



Kiel de modesta sia sankta hejmo

JOZEFO SARTO

foririnta humila pastro
riĉa nur je dia favoro
atingis superegan universalan patrecon
sin nomigante Pio X
tiel de tiu ĉi modesta preĝejeto
al li Sanktulo dediĉita
foriru Lia dua beno al tuta mondo
per Esperanto
kiun li antaŭdiris
plej forta ligilo universala
inter katolika filaro
kaj por ama interkonmpreno de la homaro

EI K. S.

Czeslaw Ostankowicz,
el la libro: Tero Vaporanta Ciklonon.

NOKTO DE PATRO SIMFORIANO


La dudekan de aprilo 1942 mi travivis nokton, nomatan poste en koncentrejaj legendoj « la nokto de Patro Simforiano ». Pro la antaŭnomo de mia amiko.

Informon pri tio, ke ĝi estos la nokto speciale terura, alportis al ni militkaptitoj, bonegaj kamaradoj de koncentreja lukto, konspiro kaj malbonsorto. La rusoj antaŭsciigis nin pri alveno de trupo de tiuj, kiuj elmurdis la plimulton de transporto de sovetaj militkaptitoj: de la grupo de denuncan-

toj, konfidenculoj, murdistoj. Tiuj ekzekutistoj laboris sub la ordonoj de « kapo » Wojtczak por litro da supo, por pano, kiu restadis post mortigitaj viktimoj. Ili ricevis la taskon malpligrandigi la nombran staton de mia bloko, por pretigi la lokon por novaj transportoj al sendataj ĉi tien al la laboro. Al Brzezinka-Birkenau alvenadis en tiu periodo ĉiam pli kaj pli da laborgrupoj. Ili estis la homoj el la ĉefa koncentrejo, kaj ankaŭ alportataj senpere el la primitiva fervoja kajo.

La posta «KL Birkenau» alprenadis iom post iom aspekton de «normala» koncentrejo. Kontraŭe al la «malnova» Oŝwiecim-Auschiwitz, ĝi transformiĝadis en lagerejon multlingvan. Tie ĉi troviĝis poloj, rusoj, francoj, hungaroj, judoj, ĉeĥoslovakoj, ciganoj. Komenciĝis post la vespera apelo. Ekhurlis muĝege kaj morne staranta ĉe la enirejo en la blokon pordogardanto. Enkuranta en la barakon grandegulo, nomata de ni «La Mongolo», enbatis al li en la ventron bastonon akriĝitan kiel lanco. La kadavro de tiu kolego restis kuŝanta longan tempon. Kuntiritaj, mortaj fingroj kvazaŭ li penis eltiri la bastonon enpuŝitan en la intesteron. Ne estis permesite al ni forigi la kadavron de malfeliĉulo. Li devis esti averta sendisciplinuloj. Malantaŭ «La Mongolo» eniradis la pluaj. Malrapide ili disiradis en la bloko. La kranioj krevadis kun la sono de disrompataj boteloj. Ĝuste tiel.

Iu ekhurlis hundvoĉe. Ekkirliĝis en niaj litaĉfakoj-kokinejoj. Por mallonge. Ni kuŝis rekte, kap-al-kape. Kun la kapoj etenditaj antaŭen. Al pasantaj preter ni sbiroj ni ekridetadis per grimaco, en kiu estis timo, plaĉema kaj besteca timego pri perdo de la vivo. Mohl la unuan fojon vidata de mi el tia proksimeco, apud li Scharführer Max Schiilinger, posta funkciisto-laboristo en krematorioj, moknomata de ni «La Anaso» kaj kelkaj junaj rottenführeroj ridaĉis krakeske. Iu el inter ili laŭtvoce laŭdis nian disciplinemon. La blokisto terurigita ne sciante pri kio, ĉar nenio minacis al funkciuloj, ebriiĝis kaj ŝanceliĝe iris senkonscia. Li staris apud ni, sed mi nenion komprenis el tio, kion murmuregis lia kurbe grimacigita, saŭmkovrita buŝo. La frenezo de nia **blockälteste** fariĝis ĉiam pli kaj pli videbla. Ni konis jam la frenezajn kriojn, la kantadon de nia blokisto,



Pastro Henry Josef, kiu pasintjare festis oran jubileon de sia sacerdotiĝo, estas pioniro de Esperanto en Devagiri College en Kozhikode 8 (Hindujo). Jen li (meze) kun siaj Esperantaj studentoj.

sed neniam mi vidis lin en tia stato, kiel en tiu nokto.

La ekzekutistoj ekmoviĝis dense unu apud la alia. Ili rigardis en la larĝe apertajn okulojn de la kuŝantoj kaj al unu el la kvin kranioj, eligitaj el la dormfako, disdonadis la mortigan baton. Kiel longe tio daŭris? Provu mezuri la longecon de la tempo en tia momento. Ĝi devis tamen daŭri sufiĉe longe, ĉar Mohl fine enuis pro tiu « distro ». Li donis al « La Mongolo » iun ordonon, kaj la fiestro de « mordkommando », kiel ni nomis tiujn te-

rurajn homojn, kunvokis siajn helpantojn. Ni sciis, ke sekvos la dua parto de tiu ĉi mistero. Ni ne atendis longe. Per vea voko iu petis pri kompato. « Ili pendigas » — oni kriis de ĉiuj flankoj: Pole, ruse, france, jude, ĉeĥo. La kriantoj lamentis mallonge. Pli longe kaj per pli penetranta voĉo lamentis tiuj, kiujn oni pendigadis je la piedoj kaj tutfinadis ilin per bastonbataĉo celita en la interkruran korparton.

(daŭrigota)

LA PLEJ BELA RIDETO EN LA MONDO

En 1927a ni loĝis ĉe Gabon, en Talaguga, misia centro lokita sur insulo de la granda rivero Ogué norde de Lambaréné. Ĝuste tiam Nyngon eniris mian vivon, suferplene same kiel multa tieaj amikoj.

Nia kolego misiisto revenis el longa evangeliza perbarkevojaĝo, de regiono negastama kaŭze de praarbarego kaj de la rapidfluo de la granda rivero. En povra vilaĝo de tiu malproksima regiono, akurate vizitante ĉiujn kabanojn, li eltrovis Nyngon' tute senfortigitan, malrapide konsumitan de tre malbonodora gangreno ĉe kruro. Penege li sukcesis ŝin enbarkigi. Nun sub la vertikala suno la remistoj lacige streĉas por atingi la insulon antaŭ la vespero. Aŭdante iliajn kantojn la insulanoj rapidis, kiel kutime, al la enŝipigejo por akcepti la revenantojn.

Nur post la albordiĝo mi ekvidis, sternita sur la fundo de la barko, Nyngon' kun ŝia kruro ĉirkaŭvolvita per bananfolioj, kovrata de arego da muŝoj kaj eliginta naŭzegan molbonodoron. El ĉiuj grandaj mizeroj, mi jam plurfoje estis vidinta, ĉi tiu ĉiujn aliajn superis. Terura ulcero atakadis kaj jam komplete formanĝis ŝian tibikarnon: la tuta kruro estis difektita ĝis la osto. Depost kiam Nyngon troviĝis en tiel kompatinda stato?

Tuja ago estis neprokrastebla. Ni disponis nur senpagan konsultapotekon tre elementan kaj tro malgrandan por seriozaj malsanuloj. Tamen ni faris el la neceso virton.

Komence, la edzo de Nyngon montriĝis tre servema portante mem, surdorse, matene kaj vespere, la malsanulinon al la kuracejo. Poste, iun tagon, abrupte, li diris: « Mi foriras ». « Kiam vi revenos »? — mi demandis iomete naive. Mirigate, li min rigardis, kaj: « Sed neniam plu, kompreneble! Mi estas tedita, mi plu ne povas esti la edzo de kadavro », kaj post pripensa momento: « Ĉu vi estus kontenta dormi kun kadavro »? Ja, vere, lia rezonado estis sufiĉe logika!

Li neniam plu revenis.

Mi timis la malesperon de Nyngon. Kontraŭe mi trovis ŝin serena, ridetanta kaj kuraĝa kiel ĉiam, pro tio ke ŝi plibone ol mi konis sian edzon kaj la paganajn tradiciojn de sia gento.

De tiam la ligilo min kuniganta al mia malsanulino fariĝis neesprimita amikeco

sen iu ajn senutila vorto. Mi devenis trans ŝia fizika mizero, la delikatan sentemon de koro ĉiam direktata al proksimulo, plenplena je nekomparebla amo.

Iom post iom per multe da zorgoj, la infekto de Nyngon malgrandiĝis, iom da freŝa karno ekestiĝis donante al ni esperon, kuraĝon kaj persiston.

Tuj kiam la malsanulino sukcesis finfine salteti, helpe de longa bastono, ŝi komencis oferi siajn servojn ĉe la kuracejo. Tiel, estis malkaŝite al mi, ke ne nur bona sed ankaŭ inteligenta ŝi estis. Kiom da malfeliĉuloj helpis kaj rekuraĝigis ŝia mirinda rideto!

Post unu jaro kaj duono ankaŭ se ne ankoraŭ komplete resaniĝinta, certe ŝi estis preskaŭ plene rendimenta.

Post provtempo en Lambaréné kaj la repozperiodo en Svislando, mia edzo reiris sola al Talaguga. Ni devis translokiĝi al Oyem, ĉe la landlimo apud Camerun,, nia destinita nova sidejo, por kunlabori en la kunfondo de nova centro. Do, mia edzo devis trovi kaj prepari nian estontan loĝejon.

Apenaŭ li elbarkiĝas, jen, antaŭ li Nyngon ĉiam dolĉa kaj ridentanta. Ŝia sanstato estas plibona, sed la kruro ankoraŭ bandata. Mia edzo restis dek tagojn en Talaguga por prepari la surkape transportotajn pakaĵojn.

Nyngon montris grandan intereson por tiu ekspedo kaj precipe por tiu lando, kie la virinoj estas ankaraŭ paganaj kaj ne konas ŝian grandan ĝojon. Ŝi rakontas pri sia vizio: «Jes, vere, Dio parolis buŝe al mi dirante, ke mi devas iri al Oyem kaj al tieaj virinoj, ke Jesuo amas ilin». La misiisto rigardas Nyngonŝ kaj ŝian difektitan kruron kaj respondas: «Ne, la vojaĝo estas tre malfacila, la piedsignaro abomeninda kaj la haltejoj tre longaj! Ne, mi tute ne intencas preni sur min tian gravegan respondecon!». Dum la tuta periodo de la preparaĵoj Nyngon ĉiutage reaperas kun sia ĉiama pacienca rideto. Senŝacele fidela al la dia alvoko, daŭre, obstine ŝi insistas!

Fine, la forir-mateno, jen ŝi estas kun sia mato rulumita kaj lokita sur la kapo, paketo kaj la manĝaprovizio ligitaj malantaŭ la dorso. Kion fari? Ĉe tiu punkto ankaŭ misiisto devas kapitulaci!

En sia vojaĝ-raporto mia edzo skribis:

«Hodiaŭ ni trairis 42 kilometrojn; la karavano estas tute lacekonsumita kiam ni finfine alvenas al la vilaĝo destinita al kampado. Kaj morgaŭ, je la kvara, ni denove devas esti survoje. Mi estis ĵus enlitiĝinta, kiam jen Nyngon, kiu sin prezentante plenespekte antaŭ mi, diras: «Mia misiisto, ĉu vi volas, ke mi kunigu la homojn por preĝi?»

«Ne, ĉivespere ni estas tro lacaj, iru ripozigi vian kruron». Mi kviete endormiĝas. Subite vekas min psalmo strange resonante en tiu perdita praarbara vilaĝo. Mi ellitiĝas kaj trovas Nyngon' aspektanta sacerdotino kun la vizaĝo lumigita per la kampada fajro, zorgeme direktanta la preĝojn. Certe ŝi ne estis trovinta la vojaĝon tro «masbuĉanta» puŝata de la bezono evidentigi sian grandan, internan ĝojon, amasiginte la homojn, ŝi atestis pri sia propra kredo rakontante la mirindan historion de la kristnaska donaco al la homaro».

Multajn jarojn Nyngon estis en Oyem senkompara katekistino humila fidela, dum naskiĝis kaj daŭre pligrandiĝis, tra malfacilaĵoj kaj penadoj,, juna eklezio tumultema kaj entuziasma.

Bezonate estis instrui la virinojn. Ili amase respondis al la alvoko per la «dia laboro» laŭ la esprimo de la ĵus konvertitoj mem.

Ĉiam ni laboris kune. Ŝia memoro estis vere escepta. Laŭ mi, ŝi (kiu estis analfabeta) sciis parkere la evangeliojn.

Ŝiaj mesaĝoj estis ĉiam tre viglaj kaj plenaj je humoro. Kvankam sen edzo kaj sen filoj — abomeninda kondiĉo en pagana societo — al ĉiuj ŝi imponis respekton. Ŝi estis tre interesata al la «korpa katekismo». Kiam la virinaj grupoj estis organizitaj, Nyngon persone sin okupis pri ili. Ĉiusemajne ŝi trapasis 50-60

kilometrojn, ĉiam lamante kaj ridetante, por atingi la vilaĝojn. Forirante la unuan fojon, ŝi petis de mi: « Donu al mi buŝon ». Kiel pitoreska pentraĵo! Antaŭe Nyngon, kun sia senkolora vesto, portante la sanktan libron, poste la « buŝo » (vizitanto de la lernejo jam kapabla legi) kun la pakaĵo. Ho, ne nur ĉe la angla kortego ekzistas cerimoniaro!

Kelkfoje, kiam ni iris kune, mi parolis al ŝi: « Nyngon, mi estos virino tute sama kiel la aliaj », kaj mi iris sidiĝi inter la virinoj, sur trunka benko, en la malgrandan kabano-preĝejon. Ŝi transmetis miajn lecionojn kun granda ekzakteco kaj bone adaptiĝante ilin al la cirkonstancoj.

La eklezio kreskadis: nun ĝi estas sepjara. La misiistoj kaj la afrikaj katekistoj opinias, ke alvenis la momento por elekti kunsidon de la plejmaljunuloj. Nomoj estas proponataj. Je granda miro de la misiistoj, la afrikaj katekistoj diras, montrante Nyngon': « Ni volas tiun virinon ».

Nyngon sidiĝis, unika virino, dignoplena kaj simpla, en tiu historia kunsido. Por partopreni kunsidojn, laŭ sia natura humoro, ŝi levis ĉapelon sur sian tolfulardon. Estis ja tre strange, sed ŝi rigardis tion kiel simbolon de la nova altranga ofico. Ĝismorte ŝi restis fidela al sia alvokiĝo. Ĉiam, matene, je la ektaĝiĝo, post la preĝo, kiu kunigis la junan religian societeton, Nyngon venadis saluti min kun sia mirinda rideto. « Ho, mia amikino » — mi diris al ŝi iun matenon — « Via vizaĝo brilegas kiel la suno »! Kaj ŝi, kun ŝia neimitebla mimiko: « Ho, sinjorino, ĉimatene Jesuo metis tiel multe da lumo en mian koron, ke ĝi eliras el miaj okuloj, oreloj kaj buŝo... ĝi elverŝiĝas ĉien, kaj mi volas oferi ĝin al vi kiel amikan donacon ». Kia superbela donaco! Estis, ja vere, la plej mirinda rideto en la mondo, rebrilo de la lumo de Dio donita al la tuta homaro.

Olga Christen
svisa protestanta monaĥino
(Traduko de Prof. N. Dall'Aringa)

LEGANTOJ SKRIBAS

SVACEK MILOSLAV (ĈS) skribas:

Estimata nova redaktoro de Espero Katolika!

Mi gratulas pro via redaktoriĝo kaj deziras al vi multajn Di-benojn kaj Di-gracojn dum la redaktor-laboroj. Ni, la ĉeĥaj katolikaj esperantistoj tre ĝojas, ke EK estas en la manoj de pastro, ĉar tio garantias eviton de teologiaj eraroj sur la paĝoj de EK. Krome ĝojiga estas la fakto, ke la organo de IKUE, EK estas redaktata en Italio, en proksimeco de la IKUE prezidanto, nu kaj tio garantias purecon de la enhavo. Italio ja estas lando, kiu portas koron de nia Eklezio, sanktan Patron Paŭlon VI, al kiu ĉeĥaj katolikoj ĉiam restos fidelaj. Nur bedaŭrinda estas la afero, ke ĝis nun validas malpermeso de importado de EK — kaj ceteraj religiaj presaĵoj — en nian landon.

Nur pere de mia varsovia amiko mi sciiĝis, ke en EK aperis mia artikoleto pri sac. Longoni. Povas esti vera, ke en la fermita koverto — kiel letero — estas ricevebla ankaŭ EK. Certe pro altaj poŝtelpezoj de la fermitaj leteroj — kovertoj — ne estas eble havigi al niaj kat. esperantistoj EK-n. Almenaŭ 10 EK ekzempleroj sufiĉus al nia sufiĉe nombra anaro, ĉar pere de pruntesenda servo povus ĝin legi

pli multaj niaj IKUEanoj. Sed ni esperu, ke denove revenos la tempo, kiam ni plu povos ricevadi nian organon EK.

Estimata Sinjoro redaktoro, ankaŭ nunjare okazos nia — neoficiale — katolika tendaro, kiun mi ĉiujare preparadas. Do ankaŭ jam nun mi komencis preparojn de la nunjara Libertempa E-tendaro. Certe ni volas, ke ankaŭ nunjare partoprenu ankaŭ kelkaj eksterlandaj katolikaj esperantistoj, kiel en pasintaj LET. Ĉu estas publikebla en EK ĉi tiu jena mallonga sciigo?

Kiu volas julie libertempi en Ĉeĥoslovakio, bonvolu peti informojn ĉe Miloslav Šváček, Penčice 16, okres Prerov, Ĉeĥoslovakio. La belega naturo kaj la frateca medio atendas vin!

Marjo Van Bentun (Nederlando):

En la decembra kajero mi legis la frazon: « La okcident-eŭropaj popoloj ne devas batali pro sia kredo ». Bedaŭrinde mi devas kontraŭdiri. La okcidento terure devas batali kaj suferi pro sia kredo..

M. v. B.

Respondo. La Prezidanto parolis laŭ sia sperto de paŝtisto de animoj kaj pri la amaso de gefideluloj, ne pri la plej bonaj laikuloj, kiuj batalas en ĉiuj kampoj. En la okcidentaj landoj la katolikoj povas profesi sian kredon libere, sen persekutoj. Pro tia trankvileco multaj dormetas, stagnas kiel akvo senmova, malfortiĝas kiel korpo sen ekzerco. Sed la vera kristano devas batali laŭ la vorto de Kristo:

« Mi ne venis alporti la pacon, sed la militon ».

La redaktoro

Peter Van Bentun, edzo de Marjo, respondas publike al S-ro Kalny:

Kun multaj aliaj mi forte kontraŭstaras aŭtoritatojn, ankaŭ la tielnomatajn kristanajn — kiuj per cenzuro kaj — aŭ per aliaj aranĝoj kaj disponoj atakos la pornografion. Ĉu ili povus precizigi por mi, kio estas pornografio? Kial la seksan moralon tiel forte akcenti, dum ekzistas pli grandaj kaj pli pezaj moralaj problemoj, kiuj devas esti solvataj, nome la m-ondaj problemoj rilate pacon kaj justecon? La moralo estas totala. Oni ne rajtas laŭ bezono aŭ bontrovo emfazi nur parton, ekzemple la seksan, kaj samtempe neglekti aliajn partojn. La ĉasta vivo de multnombraj unuopuloj ne povas ĉesigi la ankaŭ de S-ro Kalny bedaŭratajn tragediojn de Vietnamio, Orientpakistano, Biafro kaj aliajn...

P. v. B.

Respondo. Mi ne scias kion skribos S-ro Kalny. Por niaj legantoj mi volus aldoni mallongan klarigon. Ni ne devas forgesi aŭ neglekti aliajn problemojn, kiel tiujn de la paco, de la justeco k.t.p.

Sed ankaŭ la problemo de la pornografio estas tre grava. Oni devas distingi inter seksaj valoroj kaj pornografio, Multaj senskrupolaj homoj volas gajni multe da mono ekscitante la pasiojn kaj oferante erotikajn plezurojn per bildoj, rakonto, sugestoj ktp. Jen la lavango de gazetoj, filmoj, ktp. Kiu estas la rezulto?

La edukistoj scias laŭsperte kiom da domaĝoj alportas, precipe al la junularo, la pornografio. La plej belaj idealoj cedas la lokon al malmoderaj deziroj kaj al hontinda servado: la servo al malnoblaj pasioj.

La redaktoro

J. Tujnder (Nederlando):

Rilate al fideleco al Papo certe temas pri problemo, sed estas klarige fari distigon inter « aŭdi » kaj « obei ».

Estas evidente, ke la unua voĉo, al kiu mi kaj ĉiu kristano devas obei, estas tiu de Dio kaj Lia Vorto, kiel ili parolas per mia konscienco. Nur kiam la papa juĝo por mi estas konforma al tiu voĉo supera, mi povas konsciencie obei lin. Se mi opinias ĝin persona opinio de la papo, mi devas aŭdi lin. Certe! Estas do diferenco inter obeado kaj aŭdado (de homoj, naturo, spertoj, historio, ktp.).

Kompreneble mi amas kaj respektas la Papon, same kiel mi amas kaj respektas ĉiujn homojn, sed mia obeado ne estu blinde ŝafa, t.e. ne forprenas mian personan respondecon. Vi ja nomas la papon reprezentanto de Kristo, sed vi prisilentas, ke li estas ankaŭ ŝtatestro, politikisto, diplomato, defendanto de iama filozofio.... Konkrete mi ne obeos al la Papo, se li ne defendas la rajtojn de la marriĉuloj kaj konsekvence ne kondamnas reĝimojn, kiuj maejustecon. Alivorte mi obeos al la Papo, kiam li parolas evangelie... Mi malaprobas ĉiun manipoladon, kiun nun mi konstatas, vidante ke redakcia komitato subtabligas opiniojn de fidelaj membroj, al kiuj oni simple mutigas la buŝon. Tio estas kontraŭevangelia kaj piedpremas la homajn rajtojn kaj baras la vojon de la dialogo... ».

J. T.

* * *

Mi konsentas kun la skribinto, ke nia obeo devas esti respondeca, ne « blinde ŝafa ». Teorie povas okazi, ke mi ne devas obei al la Papo, sed fakte li havas tiom da lumo kaj da respondecento,, ke malobeo estus malprudenta. Kiu kristano povas konvinkiĝi, ke lia konscienco havas tiom da lumo kaj certeco, ke li povas diri: « certe la Papo eraras »? Rilate la opiniojn de niaj legantoj: la redakcio kelkfoje ne publikigas opiniojn tro akrajn aŭ skribitajn tro malklare. Sed ĝenerale ni publikigas la alvenantan materialon: ni celas utilan dialogon.

La redaktoro

Prof. Korry Van Kleef skribas:

Nun pri enhavo de E.K. Ĉu ĝi pliboniĝis? Koncerne la lingvan uzon E.K. forlasis sian antaŭan altan nivelon. Krom tio la enhavo estas tro unuflanka, sed pri tio mi ne miras. La homoj, kiuj volas trankvilan gazeton, certe povas esti kontentaj. Oni legas ĝenerale pri pli ol konataj faktoj kaj ideoj, kiuj en ĝiaj abstraktaj formoj multe distanciĝas de la konkreta ĥaosa mondo. Kie mi legis ion pri la konkreta vivo? Eble en la artikolo: « Kion faras hodiaŭ la Eklezio? ». Sed tiu artikolo post la atako kontraŭ marksismo, politikanta kristano kun duonkaŝita fido nur finas kun al mi tre malklaraj vortoj ke « La Eklezio ĉeestas kun sia patrineco ankaŭ tie, kie ĝi ŝajnas forestanta: por antaŭgardi, defendi, protekti ĉion, kio efike subtenas kaj plibonigas la tutan humanan aktivecon, laŭ la ordo de la vera progreso, materia kaj spirita » (p. 109). Vere estus granda malhonoro al la Eklezio, ke Prof. Dell'Aringa tiel abstrakte respondis konkretan demandon. Ŝi uzas kelkajn ĝeneralajn vortojn, kiuj diras **nenion**.

Sed alia konkreta temo ankaŭ estas pritraktita en E.K.; pornografio. En la decembra numero S-ro Jan Kalny deziras, ke la ekleziaj aŭtoritatuloj faros ion kontraŭ la eldonado de pornografiaj revuoj. Sed estas certe, ke la dana registaro ne aŭskultos, ĉar la ebleco de tia eldono estas frukto de la demokrata sistemo. Kion oni povas fari kontraŭ tio? Simple: **ne aĉeti** tiajn revuojn!

Sed la morala danĝero por junuloj ne kuŝas unue en pornografio, sed pli multe en la mentaleco de la homoj, inter kiuj estas edukataj. Pro tio pli granda morala danĝero estas ekz. la militservo en batalanta armeo. Okcidentanoj estas ĝe-

ne okupantoj kaj detruantoj de aliaj popoloj. Aktuala ekzemplo: Vietnamio, bone mendita, perfektigita, priŝprucita de dangeraj hemikaĵoj, jen malmoralaj agoj, ofte farita ankaŭ de katolikaj militeservantoj. Sed ĉu la ekleziaj aŭtoritatuloj kontraŭis tion?

La senmorala manifestiĝo de tiu, kiun oni nomas « okcidenta civilizacio », estas ankaŭ rimarkebla en Afriko. Katolikaj pastroj benas la tankojn, per kiuj la Portugaloj batalas kontraŭ dum jarcentoj ekspluataj homoj en Angola kaj Mozambiko. Estas terure, ke la lastaj restaĵoj de kolonialismo ĝuste estas trovataj en tiel nomata **katolika lando**. Kontraŭ tia malbono la ekleziaj aŭtoritatuloj certe povus ion fari, sed ili preskaŭ ne agis ĝis nun. La pastroj restas benis la tankojn kaj la portugaliaj episkopoj restas subteni senmoralan reĝimon. Nur la Blankaj Patroj faris agon: ili forlasis Mozambikon el protesto kontraŭ la kruela subpremo de la afrika enloĝantaro.

Do mi ne demandas: « Kion faras hodiaŭ la Eklezio? », ĉar mi jam konas la seniluziĝan respondon. Mi nur demandas: Kion mi kiel individuo povas fari laŭ la spirito de Jesuo Kristo? ». La respondo estas ĉiam konkreta: « Helpu tiujn homojn, kiujn vi povas helpi, kaj samtempe kontraŭu akre tiun mentalecon, kiu kaŭzas tiel grandan suferon al supre nomitaj popoloj... ».

Respondo de la redaktoro. Antaŭe pri la enhavo kaj la stilo de E.K. Multaj legantoj trovas ĝin interesa, plene katolika kaj altnivela, aliaj trovas ĝin monotona, unuflanka, malaltnivela. Ne estas eble kontentigi ĉiujn. Ĝis nun ni klopodis doni ekzaktajn ideojn pri kristanismo, Eklezio, ekumenismo ktp. Aliajn temojn pli konkretajn laŭ via opinio ni pritraktos estontece. La legantoj povas ĉiam esprimi siajn dezirojn. Por pli bona stilo de la artikoloj mi petos ĉiam la juĝon de redakcia komisiono. Nun pri la temo: « Kion faras nun la Eklezio? ». Estu klare, ke Eklezio konsistas ne nur el papo kaj episkopoj, sed el ĉiuj katolikoj: do vi kaj mi estas parto de la Eklezio kiel niaj episkopoj.

Pri la agado de la Papo, de la Sankta Seĝo, de la episkopoj vi timas « seniluziĝan respondon ». Ĉu vi legis la enciklikojn de Paŭlo VI? Ĉu vi scias la diplomatan agadon de la Sankta Seĝo favore de la justeco kaj de la paco en la mondo? Ĉu vi konas la agadon, ofte nekonatan, de multaj episkopoj, kiujn vi eble juĝas sensentaj aŭ inertaj?

Ĉu vi scias, kiom malfacile estas kelkfoje juĝi pri la justeco aŭ nejusteco de milito? Ekz. popolo povas defendi sin aŭ alian maljuste subpremitan popolon...

Mi bone scias, ke kompleta respondo postulus multajn paĝojn, sed ni havos ankoraŭ la okazon pri tio paroli.

Nowakoski (Pollando):

Mi konigas al vi mian impreson pri la 1/72 numero de E.K.

La kovrilo: premion al tiu, kiu faris tiel trafan, bonegan projekton de ĉi tiu kovrilo!

Malplaĉaĵoj: La letero de Z. kaj la letero al Papo Leono XIII: ekestas demando: por kiaj legantoj estas ĉi tiu letero? kiomaj legantoj komprenas? Tio ja estas kelkloke kvazaŭ krucenigmo.

Estu tamen konvinkita, ke malgraŭ iafojoj kritikoj honestaj legantoj plene aprezas vian redaktoran laboron kaj konsideras ĝin altnivela.

De La Puente:

Mi dankas vin (Prezidanton) kaj vian redaktoron pro via intereso por la hispanaj aferoj. Nia revueto estos ĉiam je via dispono.

LA KAVALIRO - ESPERANTO DE P. KOLBE

La tutan katolikan mondon plenigas laŭdoj je honoro de tiu eksterordinara polo, kiu fariĝis grandioza ornamo de la kristana nomo.

En la patrujo de Esperanto, kie li naskiĝis, en la Eterna Urbo, kiu formis lian intelekton kaj koron, en la lando de la floranta ĉerizo, kie aktivas lia verko, en ambaŭ amerikoj, afriko kaj aŭstralio, ĉie la nomo de Patro Maksimiliano-Mario estas benata pro feliĉa aŭguro de pli bona estonto.

Hodiaŭ, kiam li staras sur altaroj kaj predikas sindediĉan amon, amon, kiun bezonegas la pacosopira mondo, lian nomon elparolas kun respektoplena estimo ankaŭ ĉiuj esperantistoj, vidantaj en li heroon inspiranta nian nuntempon.

... jam en monato novembro 1931, la antaŭ nelonge beatoproklamita P. Maksimiliano Kolbe skribis interalie el Japanujo al Patro Justino Nazim, redaktoro de la pollingve eldonata « Kavaliro de la Senmakula » ĉienajn signifoplenajn vortojn:... » **ankaŭ Kavaliro esperanto trovus certan sukceson eĉ ĉi - tie en Japanujo** »...

Pli malfrue, en 1937 okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, la nuna Prezidanto de IKUE-anoj P. Paruzel ricevis de P. Kolbe korespondajon, en kiu li aprezas la internacian kunvenon kaj instigas la polajn verdstelanojn al sindediĉo por la altaj idealoj de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Bedaŭrinde la lasta kruela mondmilito de 1939-45 neniiĝis ĉiujn postsignojn, ĉiujn notojn pri tiu edifa leterinterŝanĝo.

En 1971-post la imponaj oktobraj festoj en Romo, dum kiuj Paŭlo VI beatoproklamis P. Maksimilianon, Fr. Kornelio el la pola Mari-hejmo en Niepokalaów, skribis al la P. Paruzel, ke oni ne povas trovi pli precizajn menciojn pri Esperanto inter la dokumentoj ligitaj kun la nova Bea-

tulo. Ankaŭ la ekzempleroj de la « Eta ĵurnalo » — May Dziennik — en kiu probable havis lokon raporto pri la Universala E-Kongreso en Varzawa malaperis dum la dua mondmilito. Oni ne povas aserti, ĉu ie en la mondo ekzistas numeroj de la « Eta ĵurnalo ». Samtempe oni konstatas, ke en la korespondaĵo de tiuj beata P. Kolbe el la jaro 1937 mankas kopio de letero al nia Pola Samideano.

* * *

Frapas tamen ĉiun esperantiston kaj meditigas la frazo de nia suraltarigita nova Beatulo pri la **Kavaliro-esperanto...** kaj ties senduba sukceso en Japanujo.

Kiam en 1931 P. Kolbe estis en Nipono, la tieaj Zamenhofanoj akiris laŭtajn atingojn en sia Patrujo. Tiam Radio Osaka disaŭdigis lekcion de S. Ŝindo. La grandaj efikoj altigis la nombron de lokaj grupoj al 163 tra la promesdona lando. En oktobro estis kunvokita Espo-Kongreso en Kioto, pri kiu certe legis P. Maksimiliano kaj post ĝia estiĝo li povis skribi la notindan, suprecititan frazon al sia pola Kunfrato.

Memkompreneble leginte en Japanujo pri nia mondlingvo Patro Kolbe bonege konsciis la esprimon « kavaliro-esperanto ».

Esperantistoj, kiel konate, formis kaj formas ĉiuloke kvazaŭ mezan ordon inter la « pleba » kaj « patricia » tavoloj. La pleba amaso parolas ĉefe nur la gepatran lingvon, dum la « patricia » socio, la pli alta klaso, scias ankaŭ fremdlingvojn.

Kavaliro esperanto estus do en la okuloj de P. Kolbe kvazaŭ nobelo, kiu distingiĝus pro sia sinteno al la proksimuloj por ilin interkomprenigi kaj gefratigi. Kavaliro esperanto akompanus la Damon de sia koro, aŭ pli ĝuste-la Amon de ĉies koro, por ke kreiĝu esperantujo el la monda popolo.

La kavalirismo iam militista institucio nun esperantista arigas ĉiujn pacajn bataiantojn.

Kavaliro esperanto-estas laŭ P. Kolbe ankaŭ Kavaliro de la Senmakula, kiu naskis la Princon de la Paco.

Elokventa estas la fakto, ke P. Kolbe, post kiam li en 1936 sendis en ĉiujn terpartojn sian Kavaliron en latina lingvo, gratulas jam en 1937 la polajn samkredanojn, en letero, perdita dum la milito, pro sindono por la IKUE-idealoj kaj por la Zamenhofa mondlingvo. La senco de la letero estis por la Pol.K.U.E.-anoj klara: Oni devas per esperanto konkeri la mondon por la Senmakula kaj ties Dia Filo. Jes, tion povis esperi nur Li, kiu alvokis ĉiujn popolojn al laborkonkuro kaj rivaleco en la servoj al la Senmakula Maria.

* * *

En la tre interesa, leginde skribita libreto sub titolo: «Moderna Martiro», kiun esperantlingve eldonis en 1961 la Fratoj de la Karito en perfekta traduko de Fr. Leotado De Ruyver f.c. ni substrekis jenan frazon: Ankaŭ se vi povas fari nenion alian ol preĝi kaj

sufери, vi povas esti perfekta Kavaliro kaj apostolo de Maria kaj forta subteno por ĉiuj, kiuj praktikas la eksteran apostolan laboron.

Patro Kolbe donis sian vivon por sia samsortano destinita al morto, servis la Amon ĝis ekstrema konsekvenco kaj montris, ke ni devas en plena sindono esti ne nur istoj de espero, sed ankaŭ de la kredo kaj amo. Sen kredo, espero kaj amo por niaj kunhomoj, ĉiuj lingvoj de la mondo ne estigos la tuthomaran familion.

Ekzistas nenia dubo, ke la nove beatoproklamita Polo, kiun la katolika Eklezio suraltaris-benas nin esperanto-kavalirojn sur la ĝusta irenda vojo de nia movado, tiom ege bezonata de la tempoj kiuj alvenas.

Sac. Kowalski Poznan

* * *

MODERNA MARTIRO, biografio de Patro Maksimiliano-Mario Kolbe, en la traduko de Fr. Leotado De Ruyver f.c. estas havebla ĉe la Fratoj de la Karito, Instituto S. Kamilo, BIERBEEK - Belgio.

LA RAPORTO PRI NIA VOJAĜO

(Monsinjoro J. Mulolwa kaj Patro Christiaens ekde la 17-a ĝis la 27-a de septembro 1971, en Jugoslavujo.)

Je la unua fojo mi traveturis Jugoslavujon dum ses semajnoj ekde la 18.a de aprilo ĝis la 31.a de majo. Ĉifoje la vojaĝo daŭris nur 10 tagojn, kun mia episkopo de Baudouinurbo, Kongo-Kinshasa, Monsinjoro J. Mulolwa; mi veturis kun li laŭ lia deziro. Ni eniris en flugmaŝinon en la flughaveno de Bruselo; ni haltis en la urbo Milano kaj tie mi vizitis sacerdoton Longoni, nian prezidanton de I.K.U.E. Tiu konatiĝo ĝojigis min ege kaj ni konversaciis dum du horoj pri esperantaĵoj.

Ekde Milano ni flugis ĝis Zagreb, la ĉefurbo de Kroatujo. Ni loĝis en la ĉefepiskopa domo kaj lia ĉefepiskopa Moŝto Franjo Kuhariĉ nin tre afable kaj korege akceptis. Li invitis Monsinjonon Mulolwa iri al la seminariejo de Samobor kaj alparoli al la lernantaj seminariistoj. Lia prelego tre plaĉis al ili; sed dum nia vojaĝo ni ne povis paroli al la grandaj seminariistoj de Zagreb, de Sarajevo, kaj

Split, ĉar ili heime restadis dum la somerferioj kaj ili revenos nur en sian seminarejon je la 1a de oktobro.

Ni ekskursis kun la ĉefepiskopo kaj lia aŭto alportis nin ĝis Sljeme, la ekstrema punkto de la montaro, ekde tiu loko ni admiris sube la panoramon aŭ la cirkaŭvidaĵojn de la belega urbo Zagreb. Vespere ni ĝojis vidi en kinejo la belegan koloran filmon « Quo Vadis ».

Ni konatiĝis kun pluraj religiaj komunumoj aŭ kongregacioj kiel la Patroj Jesuitaj, Dominikanaj kaj Salezianaj kaj ankaŭ kun pluraj religiaj Fratulinoj kiel la « Ancillae a Puero Jesu » kiuj deziras iri al misiolando.

Post kelkaj tagoj ni forvojaĝis ĝis la urbo Sarajevo kie ni korege akcentitaj estis de Monsinjoro Cekada, ĉefepiskopo de Sarajevo kaj Prezidanto de la « Propagande de Fide » por la tuta Jugoslavujo. La nova episkopo de Mostar, Moŝta Monsinjoro Paul Janiĉ akompanis nin al la seminariejo de la Patroj Franciskanaj; tie Monsinjoro Mulolwa sukcese alparolis seminariistojn, kiujn varme aplaudis lin.

Monsinjoro Cekada diris al Monsinjoro Mulolwa ke unu sacerdote prepariĝis por eniri en misiejon, kie la misiistoj parolas franclingve, kaj li esperas ke tiu sacerdote povos helpi Monsinjonon Mulolwa en lia apostola laboro.

Laste ni daŭrigis nian vojaĝon ĝis la marurbo Split. Ĉar la Episkopo ne ĉeestis, ni loĝis ĉe la Franciskanaj Patroj kaj ni estis akceptitaj kiel en familia rondo. Precipe la Vic-provincestro Patro Roko Tomiĉ ĝojigis kaj helpis nin multfoje. Monsinjoro Mulolwa havis okazon viziti plurajn komunumojn de religiuloj kaj religiulinoj. Li parolis al la mangrandaj seminariistoj de Poliud kaj Sinj pri sia diocezo, ankoraŭ al la grandaj seminariistoj de Makarska kaj al la noviculoj de la insulo Visovac. Ankaŭ en Spit li parolis al multaj fratulinoj de diversaj ordenoj; multaj inter ili deklaris ke ili volos lerni la francan kaj afrikan lingvon kaj eniri en kongon por helpi Monsinjonon en lia disvastigo de la fido.

Ni povas konkludi nian raporton kaj diri ke Dio benis nian vojaĝon tra Jugoslavujo en la tri urbegoj Zagreb, Sarajevo kaj Split.

La 27-an tagon de septembro ni eliris de la belega kaj gastema lando Jugoslavujo por alveni al la flughaveno de Roma. Post kelkaj tagoj Monsinjoro Mulolwa forveturis tre kontente de Eŭropo por reiri al sia diocezo de Baudouinurbo en Kongo-Kinshasa.

AL LA FILO KIUN MI NENIAM HAVOS

Ne ploru, mia fil', ĉar estus vane...!
Sur stelkusen' kliniĝu. Enlitigas
la nokto cin, kiel patrino, ame.
Kaj, je l'aŭror' al mi ridetu ĉiam.

Vivas kaj vivos ci el freŝa sango
de mi graveda. Ho! neblaj revoj
kiel radik' kiu fariĝas branĉojn
plenfruktajn el des pli profunda tero.

Kiel odoras ci, filet', je mirho!
Mi cin fordonis kiel bruloferon,
kaj ci min lasis kun ŝirita sino.

Pro ci, kiu sufokas naskiĝemon
en mezo de l' silento, kara filo,
min nomas Patro voĉoj mil de l' tero.

Sac. Climent Forner
(Kataluna poeto)